

# Bona Espero



## Cirkulero 62

### por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ 📠 +49-(0)2902-911323 ★ ✉ u.nelken@t-online.de

Juli 2004


Karaj amikoj,

ne, mi ne forgesis ĝin, la cirkuleron 62 kaj ankaŭ ne la do planitan pentekostan limtagon. Sed ni volis atendi la revenon de Clarimundo Barbosa Neto (« Tota »), ekslernanto kaj nun ankaŭ estrarano de Bona Espero, al Brazilo post lia unika rondvojaĝo tra Germanio, Pollando kaj Italio. Krome ni ŝatis publikigi mallongan rakonton de Aneta Ubik el Germanio, kiu vivis en Bona Espero dum la lastaj ses monatoj kiel volontulino.

Jen ŝia travivaĵo:

*“Saluton Sinjoro Mefito!*

*Saluton karaj! Antaŭ kurta tempo mi revenis el la fora Bona Espero al mia hejmurbo, al mia familio en Weil am Rhein. Ankoraŭ mi sentas fortan, saŭdadon'... Ĉu vi konas tiun vorton? En portugala oni diras „Estou com saŭdade“; tio signifas ke oni dolie sopiretas pro tio ke oni ne plu povas esti kune kun la amikoj.*



*Repensante mi konstatas, ke la duonjaro en Brazilo estis ege riĉiga en ĉiu aspekto. Mi povus plenigi paĝojn kaj paĝojn rakontante pri okazintaĵoj!*

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede  
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

kasistino:

Dagmar Rahn ☒ Hirschfeldstr. 3 ☒ D-59581 Warstein  
☎ +49-(0)2902-700330, 📠 +49-(0)2902-700328 ✉ dagmar@rahn76.de

*Do, jen mi elpiku etan epizodon, kiu okazis en la bieno.*

*Unu bela tago en Bona Espero finiĝis, la suno jam de longe kaŝiĝis kaj mi zorgis pri tio, ke la infanoj preparigu por dormi. „Brosu la dentojn! Surmetu pijamojn! Ne manĝu dentopaston!“ - ĉio iris glate. Fine, je la 21:15 ĉiuj kuŝis en la litoj kaj ankaŭ mi faris tion.*

*Sed ĉi-nokte, mi dormis en la domo de la infanoj, pro tio ke Ursula kaj Giuseppe restis en Alto Paraíso por aranĝi multajn endaĵojn. Mi fermis la okulojn. Bela silento. Mia aŭdokapablo akriĝis kaj la oreloj perceptis multajn endormigajn sonojn: kantoj de griloj, profundaj ritmaj en- kaj elspiroj de la infanoj kaj „flum!“, versajne denove mango, kiu falis de arbo.*

*Subite mi aŭdis grandan bruegon el la kuirejo. „Ĉu estas iu infano, kiu volas trinki akvon? Ne... tian bruon ili ne kutimas fari!“, mi pensis. Jen mi komencis sviti, ĉar la laŭtaj sonoj de falantaj potoj ne ĉesis. Felice ke la infanoj kviete dormas. Do, kunpremante la pugnojn mi eliris el la dormoĉambro, firme decidite atingi la kuirejon. Kiam mi estis tie, mi levigis la kapon por vidi pli bone, streĉis ĝin supren, pli kaj pli - ho ve!*

*En la granda poto, kiun ni uzas ĉiutage, sidis komforte mefito (stinkbesto)!*

*La sekvo de tiu vizito estis evidenta. Akra fetoro penetris la tutan bienon.”*

*(Aneta Ubik)*

Samtempe Clarimundo vojaĝis tra Eŭropo kaj li ŝatis danki per tiu raporto la multajn esperantoparolantajn gastigantojn el ĉirkaŭ 30 urbojn, kies noman mencion ni tie ĉi rezignas.

Li emocie esprimis siajn pensojn kaj sentojn post tiu evento:

"Mia vojaĝo en Eŭropo

'Ludwig van Beethoven' - mi aŭskultas la himnon de Eŭropo en Pollando. La esperantistoj emocie kaj ĝoje diras: "Por la unua fojo, ĉar ek de noktomezo ni estas ankaŭ parto de la Eŭropa Unio". Alveninte en Pollando en la nokto de la unua tago de majo, mi travivis historian momenton en tiu lando.

Nur nebula  
komprenon mi havis  
ĝis tiu momento pri  
la fakto ke Eŭropo,  
tero granda kiel  
mia brazila  
Patrujo, estas  
dividita en pli ol 30  
diversaj politikaj  
nacioj...



Danke al Esperanto,  
danke al la iniciato

de germanaj esperantoparolantoj mi havis dum la monatoj aprilo kaj majo la ŝancon konatiĝi kun parto de Eŭropo, realigi mian revon vidi neĝon sur la Alpoj Montoj, antikvajn palacojn, la famajn germanajn mezepokajn konstruaĵojn, iom da itala kulturo, interkonatiĝi kun tiom da karaj kaj koraj esperantistoj, ree paroli kun iuj, kiuj jam volontulis en mia hejmo Bona Espero, percepti kio signifas vere frosti kaj havi malvarmajn piedojn, vidi la nordan maron kaj la adriatikan maron kaj partopreni la elektokampanjon de la unua esperantista deputitino de la Eŭropa Parlamento, Margareta Handzlik!

Ha! Kia emocio vivi en tiu malnova mondo tute nova por mi, kampara brazila studento, eksa lernanto de Bona Espero!

Malfacilas esprimi mian senliman dankon al ĉiuj bonvolaj homoj, kiuj ebligis al mi tian sperton. Mi komprenas, ke la vivo regalas min per valora riĉeco - esti membro de la granda familio de Esperanto parolantoj. Mi nun pli bone

komprenas la signifon esti parto de movado sen profitaj celoj, movado de homa solidareco, movado kun granda idealo. Oni akceptis min en la intimeco de sia hejmo kiel membro de la familio.

Dankon karaj eŭropaj esperantistoj! ...

Specialan dankon mi deziras esprimi por la brila organizado de s-ro Wolfgang Loose, al la kara paro Nelken, kiu tiel kore helpas al la laboro de Bona Espero de jaroj, al ĉiuj membroj de la Subtena Asocio kaj al ĉiuj gastigantoj.

Preskaŭ duono de la gastigantoj jam konas persone Bonan Esperon kaj pro tio estis por mi ege interese viziti iliajn hejmojn. La programo de rondvojaĝoj de esperantistoj estas laŭ mi ege signifa por la vizitantoj kaj por la kluboj, ĉefe en malgrandaj urboj.

Tiaj internaciaj iniciatoj montras ke Esperanto vivas.”

Kaj nun plej novaj informoj pri eventoj el la bienlernejo skribite de Ursula Grattapaglia:

„Unu el la ĝojgaj faktoj estas, ke en la Estraro nun respondecas la 'Tria Generacio', post la fondintoj, post la longa tempo de du eŭropanoj, nun eniras du ekslernantoj, por antaŭenigi la aktivecojn de nia Instituto. Adarci respondecas pri la soci-eduka departemento kaj Clarimundo [27!] pri la financoj.

Komence de la jaro ni povis enkonduki novan familion, kiu tre dediĉe kaj kompetente laboras kun ni. **Lindomar** lernis, kune kun siaj kvar gefratoj inter 1978 kaj 1982, en nia lernejo, alvenante pene per ĉevalo de 40 kilometra distanco. En 1983 la gepatroj forlasis la kampon por permesi al la gefiloj daŭrigi la lernadon en la urbeto Formosa, je 200 km de Alto Paraiso. Tie Lindomar finstudis, edziniĝis, naskis tri belajn infanojn.

Ĉiam ni restis en kontakto kaj vidis ilin vivi en la urbo sonĝante reveni iam al la vivo en la naturo, inter arboj. Dum la lastaj jaroj la edzo, agrikulturisto, restis senlabora, Lindomar laboris en laboratorio de hospitalo. Kvinope ili vivis de tre malalta salajro ŝia. - Ni invitis ilin en januaro labori kun ni. Ekde tiam **Armando** revoluciis niajn plantaĵojn. Mandioko, bananoj, multaj legomoj – li estas en sia

*elemento kaj ni admiras, kiel lia magia mano kreas abundon sur nia tero. Eĉ parton de la necesa kvanto de ovoj li komencis produkti en granda kokinejo. Lindomar zorgas la kuirejon, helpe de nia germana volontulino Aneta.*

*De decembro ĝis fine de majo **Aneta** multon lernis. Ŝi ludis violonon por ni, ŝi instruis esperanton, kaj per sia persista dediĉo lerni, ŝi je la fino kapablis ne nur baki nian panon, prepari krudajn salatojn, kuiru rizon kaj fazeolojn – baza brazila nutraĵo – sed ankaŭ prizorgi la novajn knabinetojn, kiuj daŭre kreas konfuzon! Dudekkvar etuloj kiuj intermiksas siajn ĉemizojn kaj kalzonetojn estas granda defio, sed Aneta je la fino rekonis ĉies uniformojn pro la makuloj...*



***Orlando** kaj Susi iĝis gepatroj antaŭ tri tagoj! Venontan vendredon la frato de Orlando, nia ekslernanto Sofonias, edziĝos en nia urba sidejo, kies granda salono iĝis tradicia festsalono por edziĝoj de ekslernantoj ek de pasinta jaro.*

*Sub la gvido de Adarci la **lernejo** funkcias regule kun 25 gelernantoj de la 1a ĝis la 4a klasoj. Giuseppe helpas instruante matematikon almenaŭ en la kvara klaso. La ses gelernantoj, kiuj lernas de la 5a ĝis la 7a klaso, vojaĝas ĉiutage per speciala transporto al la urba lernejo.*

*En nia domo en Alto Paraiso loĝas la gelernantoj de la duagrada lernejo.*


***Adão**, kiu finis la abituriantan ekzamenon pasintan decembron, ankoraŭ loĝas tie kaj laboras en malgranda hotelo por turistoj en la akceptejo. Per la gajnata malgranda salajro li vivtenas grandparte sian familion, kvin gefratojn, kaj diabetmalsanan patron kaj la patrinon, kiuj loĝis antaŭe en la kamparo, sed pro la tre malsana patro nun malsatas en la urbo.*

***Emanuelle** multe lernas por venontjare fini la abituriantan ekzamenon, kaj laboras semajnfine en turisma centro, je 9 km de Bona Espero.*

*Kelkaj apudaj grandaj bienoj estis venditaj kaj la novaj posedantoj alportis familiojn por zorgi la bovarojn.*

*Jen novaj lernantoj por Bona Espero! Ni estas tre kontentaj povi akcepti*

*Rhayssa(8),  
Rhaïsson (10),  
Raiene(6), Jade (7),  
Carlos Eduardo(10),  
Leidiane(11),  
Carina(9) Núbia(6)  
Lorrane(6) krome  
jam de tri jaroj*



*Alana(8) kaj Leticia(10). Tiu du hejmeniras ĉiuvespere, dum la aliaj restas dum la tuta semajno kaj nur kelkfoje iras hejmen. Per ĉevalveturilo, biciklo, piede inter dek kaj 28 kilometroj.*

*Vidi alveni en la pluvsezono la biciklojn kun po du aŭ tri infanoj estas kortuŝa. Feliĉe la gepatroj estas tre orgojlaj ke iliaj gefiloj iras al lernejo, ĉar plejparte la gepatroj estas analfabetoj.*

*Nia bela granda hundo mortis kaj ni ne volis havi novan. Grandega eraro en kamparo!*

*La grandaj ruĝaj lupoj adoptis nin: nokte ili eniris la verandojn, formanĝis la maturajn bananojn, lasante nur la ŝelojn. Ankaŭ la teruraj stinkbestoj decidis viziti nin ĉiunokte ...*

*Tiam ni decidis akcepti du novajn hundetojn, kiuj nokte bojas kaj jam kreskis por fortimigi la sovaĝajn bestojn de la savano. Bedaŭrinde unu el tiuj hundetoj pensis ke kokinetoj estas danĝeraj kaj mortigis 29 en kelkaj minutoj.*

*Pasintjara fajro forbruligis niajn 30 oranĝoarbojn kaj grandan parton de niaj 60 mangoarbegojn. Pro tio la unuan fojon ni ne povis produkti niajn kutimajn 300 kilogramojn da marmelado.*

**Adarci** en aprilo havis grandan ŝancon: ŝi vizitis dum tuta monato, kune kun aliaj 4 instruistoj el Brasilia, lernejojn en Argentino por konatiĝi kun ties pedagogiaj sistemoj, problemoj kaj solvoj. La vojaĝo estis organizita kaj financat de Rotary International kaj la 5

*instruistinoj estis elektitaj inter 30 kandidatoj. Adarci prelegis en 19 rotariaj kluboj pri sia kampara lernejo kaj ĉiam menciis esperanton. Post la reveno el Eŭropo, **Clarimundo** plibonigis sian esperanton konon notinde kaj ni ege dankas al ĉiuj, kiuj ebligis al li tiun sperton, kiu certe influos por ĉiam sian vivon.*

***Igor** ricevis inviton de esperanto familio en Sorocaba, ŝtato São Paŭlo, kiu sendis al li flugbileton kaj Adarci portis lin al la flughaveno en Brasilia. La familio konatiĝis kun Igor en Fortaleza kaj ek de tiam korespondas kaj sendas librojn kaj ludilojn al li. Li intencas paroli pri Bona Espero en la tiea esperanto klubo. Do ĉijare niaj ambasadoroj de bona volo el Bona Espero estas multnombraj!*

*Kiel vi ĉiuj certe povis legi en la ĵurnaloj kaj aŭskulti en la televido, la socia situacio en Brazilo estas eksploda. La prezidento Lula, kiu laŭte promesis “3 manĝojn tage al ĉiu brazilano”, kiu diris ke li transformis “la timon al espero”, nun estas konsiderata drinkemulo malkompetenta en la mano de la internacia kapitalo, kiu eltiras ĉiujn havaĵojn el Brazilo.*

*Ĝis nun Bona Espero nenian helpon ricevas de la ŝtato. Pro tio ni daŭre bezonegas vian subtenon!*

*Sed en tiu alarmiga situacio nia institucio klopodas pretintervivi pace, ĉefe dank al via helpo.” (Ursula Grattapaglia)*

Kaj je la bona fino – kiel kutime – ankoraŭ kelkaj komplekigoj kaj novaĵetoj:

Intertempe la geedzoj Gloria kaj Moacir definitive ĉesis sian estran pozicion en Bona Espero kaj foriris, tiel ke Ursula kaj Giuseppe kontraŭ sia planado denove devis transpreni pli da taskoj.

Supro por la estraro de nia subtena organizaĵo kaj de la amikoj de Bona Espero certe estis la vizito de la “speciala ambasadoro” Clarimundo en Eŭropo. Ekzemple en Warstein ne nur tri klasoj de du lernejoj aŭskultis al liaj kompetentaj bonfaritaj prelegoj kun interese, sed lia ĉeesto ankaŭ meritis propran elsendon de la regiona radio.

Danke al dio nin atingas ĝis hodiaŭ ĉiam denove informpetoj de junaj interesuloj pri laboro kiel volontulo en Bona Espero sed ankaŭ al aliaj helpofertoj.

Kiel Ursula skribis, estis por Bona Espero „la plej kortuŝa fakto ĉijare kiam ni povis rigardi foton de Clarimundo kun nia fama onklino **Elfriede Kruse!** Ŝi sendis al Bona Espero en 1975 la unuan pakajon kun donacoj por la infanoj kaj ek de tiam tre fidele dum dudekkvin jaroj subtenis nian laboron. - Elfriede iĝis 90jara kaj ni deziras tute speciale omaĝi ŝin per nia bulteno.“

En ĉi tiu konteksto mi ankaŭ ŝatas danki – ree anstataŭante por ĉiuj donacintoj – al la familio Matern en Warstein, kiu ekde multaj jaroj vendas en sia bio-bieno „produktojn“ de Bona Espero kaj ĉiam kolektas per speciala skatolo monerojn kaj ŝanĝmonon por nia bienlernejo. Krome ĉiu aĉetanto povas informi iomete pri Bona Espero per multnombraj fotoj, bildoj kaj aliaj informiloj.

Tia multspeca helpemeco esperigas nin, ke ankaŭ la seninterrompa torento de via netaksebla subteno same ne malaperos, pro kiu ni unufoje pli samkore dankas, kiel ni salutas niajn novajn amikojn.

Nome de la plena estraro mi deziras al ĉiuj de vi por la dua jarduono en ĉiu rilato ĉion bonan!

